Dinornito



Komparo de kivio, struto, kaj dinornito, ĉiu kun sia ovo

La **Dinornito** aŭ membroj de la familio de **Dinornitedoj** estis 11 specioj (en ses genroj)[3] de neflugantaj birdoj endemiaj de Novzelando. La du plej grandaj specioj, nome *Dinornis robustus* kaj *Dinornis novaezelandiae*, atingis ĉirkaŭ 3.7 m alte kun etendita kolo, kaj pezis ĉirkaŭ 230 kg.[4]

Dinornitoj estis membroj de la ordo de Strutoformaj kvankam kelkaj fontoj agnoskas ilin kiel separata ordo de Dinornitoformaj.[3] La dekunu[3] specioj de **Dinornitoj** aŭ laŭ loka lingvo *Moaoj* estas la ununuraj birdoj senflugilaj, kaj ne havis eĉ la vestiĝiajn flugilojn kiujn ĉiuj aliaj Strutoformaj havas. Ili estis la hegemoniaj herbivoroj en la novzelandaj arbaroj, arbustaroj kaj ĉealpaj ekosistemoj dum miloj de jaroj, kaj ĝis la alveno de Maorioj ili estis ĉasataj nur de la Aglo de Haast. Ĝenerale oni konsideras, ke plej multaj, se ne ĉiuj specioj de Dinornitoj iĝis formortintaj pro ĉasado fare de Maorioj kaj habitata malpliiĝo antaŭ la eŭropa malkovro kaj setlado.

Dinornitedoj

Troveblo de fosilioj: Mioceno - Holoceno

Paleontologia rekonstruo de Arbara moao, *Megalapteryx didinus*

Biologia klasado

Regno:	Animalia
Filumo:	Chordata
Klaso:	Aves
Superordo:	Paleognathae Bonaparte, 1853[1]
Ordo:	Dinornithiformes Bonaparte, 1853

Tipa specio

†*Dinornis novaezealandiae*
Owen, 1843

[[{{{diverseco linio}}}|Diverseco]]

6 genroj, 9 specioj[2]

Subgrupoj

- †Dinornithidae
- †Megalapterygidae
- †Emeidae

Sinonimoj

- ***Dinornithes***

Aliaj Vikimediaj projektoj

Notoj

1. ↑ Brands, S. (2008)
2. ↑ Stephenson, Brent (2009)
3. ↑ [3,0] [3,1] [3,2] OSNZ (2009)
4. ↑ Davies, S. J. J. F. (2003)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dinornito&oldid=7000968"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 00:05, 28 jul. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.